



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

septembro (2) - '92

Kiu faros similan en Eŭropo?

La Papago: Telefona Esperanta Gazeto

De la dua de oktobro 1989. funkcias telefona esperanta gazeto en Quebec, Kanado, nomata "La Papago". Ĝi estas ĉiutaga, kaj la longo daŭras inter kvin kaj dekkvin minutojn. Ĝi estas alvokbla de ie ajn en la mondo, se oni ne timas la telefonkostojn.



La telefonanto povas aŭskulti la jam ekzistantajn informojn, sed poste povas ankaŭ aldoni novajn. Tiu kontribuo iĝas la artikolo por la sekva

tago, ĉar la komputilo pli-malpli kiel telefonrespondila aparato ĝin ripetas (kiel la papago...).

La telefonan gazeton *Papago* nun ĉ. dekkvin esperantistoj uzas ĉiutage. Kelkaj jam regule vokas el Otavo, Kanado kaj el Usono. Ĝis nun ĉ. kvardek personoj kontribuis, kaj tridek aliaj estis intervjuitaj de la *papago*. La traktitaj temoj estas tre diversaj, laŭ la plaĉo de la kontribuantoj. Ofte temas pri politiko kaj pri esperantaj aferoj. Ape- ras ankaŭ spritaĵoj, eseoj, informoj, kantoj ktp.

La *Papago* celas rapide, malmultekoste kaj moderne informi pri la esperantaj okazaĵoj en Montrealo, kaj plioftigi uzon kaj praktikon (aŭda kaj parola) de nia lingvo.

Laŭplaĉe ofta "eldono"

En la Montreala regiono ne oftas okazoj uzi kaj praktiki la lingvon. Moderna vivo ja estas tia, ke multaj homoj ne plu pretas veturi. La esperantaj gazetoj estas maloftaj, kaj la televido kaj la radio estas tro multekostaj por espe-

rantaj elsendoj. La telefono do estas interesa solvo. Ĝi estas malmultekosta, kaj ĝi povas esti laŭplaĉe ofta.

Krome, male al televido aŭ radio, la aŭskultantoj povas ne nur pasive ricevi informojn, sed povas ankaŭ reagi kaj kontribui. Alia avantaĝo estas, ke oni povas telefoni iam ajn, kaj tage kaj nokte!

Du informaj sistemoj per unu telefonnumero

Krom aŭdigi la ĉiutagan esperantan gazeton, la komputilo servas ankaŭ kiel anonctabulo. La tabulo estas loko, kie oni afiŝas mesaĝojn, leĝblajn ĝis kiam oni ilin forprenas. Ĝi povas enhavi informojn ekzemple pri la venontaj e-renkontoj. Tiuj informoj de la anonctabulo estas riceblaj ĉe la sama telefonnumero, sed sendepende de la gazeto. (Fakte ĝi signifas la funkciadon de du malsamaj, paralelaj inform-sistemoj). La komputilo povas voki (kaj fakte vokas) la membrojn por memori pri kunvenoj aŭ por organizi lastminutajn renkontiĝojn, ekzemple kiam venas subite e-gastoj (ne ofta fenomeno en Montrealo).

Kiel uzi la "Papago"-n?

Por aŭskulti "La Papago"-n, simple telefo-

nu +1-514-2700054. Ĉe la fino, se vi deziras, enparolu vian komunikon (artikolon) por la sekvataga "eldono". La aparato limigas la daŭron de kontribuo je dek minutoj.

Eblas kontribui sen aŭskulti la tutan programon, post premo de "*" sur klava telefono.

Aŭskultante *La Papago*-n, se iu temo eventuale ne estus tro interesa, oni povas salti al la sekva artikolo per simpla premo al la telefonbutono "3".

La anonctabulo havas paĝojn, numeritaj inter 100 kaj 999. Jen kelkaj titoloj el ili:

- 100 - Ĝenerala prezento;
- 101 - enhavtabelo (en e-o);
- 110 - kiel uzi la *Papago*-n;
- 111 - kiel uzi la tabulon;
- 200 - Montreala E-Klubo;
- 201 - venonta renkontiĝo;
- 202 - lasta raporto;
- 210 - E-Societo Kebekia;
- 220 - Ontario E-Asocio;

Por aŭskulti la deziratan informon, simple premu la paĝnumeron, kaj vi tuj aŭdos tion.

Se vi vokas al la *Papago*, vi tuj aŭdos la tagan eldonon de la gazeto. Iam ajn vi povas iri al la tabulo aŭ reveni al la gazeto:

- » Premu #11 por aŭskulti la tabulon,
- » premu #10 por aŭskulti la gazeton.

Vi povas aŭskulti krom la taga eldono ankaŭ la kvar antaŭajn:

- » Premu 1 por iri al la antaŭa kontribuo.
- » Premu 3 por iri al la venonta kontribuo.
- » Premu 01 por iri al la eldono de la antaŭa tago.
- » Premu 03 por reveni al la eldono de la posta tago.

Daŭrigo sur la paĝo 2.

Ĉu ankaŭ vi partoprenos?

Esperanto ago-tago

La rezolucioj de pluraj verdulaj partioj, rezultitaj de lingvaj debatoj montras, ke esperanto havas multajn ŝancojn, se oni agas racie.

Debatoj pri la lingva problemo ĉie kaj ĉiam bonvenas, sed aparte utilas se ĝi okazas antaŭ granda publiko. Ĝuste la publikan manifestiĝon celas la Internacia "esperanta ago-tago" la 10-an de oktobro en pluraj ĉefurboj en Eŭropo. Tiu surstrata aktivado certe okazos mi-

nimume en Londono, Romo kaj Budapeŝto, kie oni havas du celojn:

- » atentigi la publikon pri esperanto, disdonadi flugfoliojn, informilojn (piej taŭga tempo ĉe la komenco de aŭtunaj lingvo-kursoj), do elmontri ĝenerale, ke la esperanto-movado ekzistas;
- » atiri la atenton de amaskomunikiloj, petante la publikan, televidan debaton pri la problemoj pri la internacia lingva komunikado.

Estas tre grave - krom la zorga preparo, ke la surstrata apero de esperantistoj estu kiel eble pej atento-kapta. Oni devas pre- parl diversajn port-tabulojn, transparen-

tojn, vesti sin "sandviĉ-homo", ktp. - sed estas rekomendite ne tuŝi partipolitikaĵajn aferojn, kaj neniel ataki la anglan lingvon! La ago-tago ne nepre devas esti ege serioza, ĝi povas esti ankaŭ gaja, leĝera, ja ankaŭ gravas, ke la esperantistoj mem bonfartu!

Nepre vi zorgu pri la dokumentado, fotado de la tuta aranĝo, kion poste tuj sendu al la internacia kunordiganto d-ro Alberto Menabene! Vi povas demandi lin per telefono ankaŭ pri vialanda organizanto:

Alberto Menabene,
via Monti Sibilini 3, I-00141 Roma
Tel: +39-6-890195

Strategio kaj funkcio de Informa Fako de UEA

Se Ivo Lapenna ankoraŭ sukcesis influi ĉiujn faketojn de UEA, ni konsciu, ke nuntempe la vivo tiom kompleksigis, ke ne plu eblas al individuo por regi entreprenon aŭ asocion. Post la Principaro de Frostavallen ne plu aperis alia dokumento koncerne la strategion kaj funkcion de la Informa Fako de UEA. Intertempe okazis multaj ŝanĝoj en la socio kaj en la esperanto-movado.

Principaro de informa agado

Antaŭ ol pensi pri organizaj aferoj kaj pri priskribo de taskoj kaj prioritatoj, necesas havi klaran ideon pri tio, kion ni esence celas. Unu el la premisoj estas, ke esperanto estas rimedo por kontribui al pli da feliĉo por la homaro.

Ni aktivus por esperanto ĉar tiel ni esperas trovi pli da persona kontento. Per sia agado, la aktivuloj pri informado spertu personan kontentiĝon, riĉiĝon, feliĉon.

El tiu ĉi aksiomo ni deduktas la unuan principon.

- » Inter la aktivuloj estas aro da seniluziigitaj homoj. Estu unua prioritato de la aktivulara komunumo por rekuraĝigi tiujn homojn. Se tio neniel sukcesas, ni komprenigu al tiuj homoj, ke estas pli saĝa haltigi la aktivadon.
- » Alia konsekvenco estas, ke ni instigu unu la alian por malaltigi la ambiciojn. Se ni okupiĝas pri planoj sen ŝanco de konkretiĝo, ni mem kreas seniluziigojn.
- » Tria konsekvenco estas, ke ni havu adresaron de kunlaborantoj, por konservi tiujn homojn, kiuj montriĝas fidindaj en la internaj kontaktoj.

Kio estas la persona kontento, feliĉo?

Kontenton ni sentas, kiam ni sukcesas disvolvi niajn eblecojn. Nova esperantisto ĝuas la rapidan progreson en la studado kaj konsentas paroli pri tio kun homoj en la ĉirkaŭaĵo. Iom post iom kreiĝas ambicio por diskonigi sian malkovron en la gazetaro, por aŭdigi en radiointervjuoj, ktp.

Por disvolviĝi necesas impulsoj, kaj tiuj impulsoj estas rompo de la harmonio en la cikloj. Se okazas rapidigo en la ciklo, ni spertas feliĉon. En eŭforio, ni povas pli rapide pensi, pli adekvate reagi, disponas pri pli da energio. Sed ofte, pro nekonscia timo, ni bremsas aŭ haltigas ciklon. Tio rezultas senton de frustracio, kolero, malfeliĉo, seniluziigo aŭ resume limigon de niaj eblecoj.

Estas necesa pli da memfido!

Por optimaligi niajn eblecojn necesas etoso de memfido kaj de respekto por alies aktivecoj, konsilioj anstataŭ detruaj kritikoj.

Necesas regulaj reciprokaj rilatoj inter la aktivuloj kaj la informa fako de UEA por tiel instigi unu la alian. Tamen ni konsciu, ke tro granda premo por pli da aktiveco kondukas al limigo de niaj eblecoj por aktive labori.

La intenseco de impulso dependas de la surprizo: ju pli nova, des pli intensa. Plej fortajn ĝuojn ni spertas, kiam ni travivas unufojajn spertojn. Tiuj spertoj, kiuj ofte ripetiĝas, iom post iom perdas sian specifan allogon, ĉar homoj estas plej ofte neantaŭkalkuleblaj estaĵoj kaj ĉar ni okupiĝas pri rilatoj kun homoj de plej diversaj kulturoj kaj sociaj tavoloj.

La Informa Fako de UEA estu ĉiam malferma

La informa fako de UEA estu ĉiam malferma por novaj kreivaj ideoj.

Novaj situacioj estas ofte timigaj. Ili povas konduki nin al plej grandaj ĉagrenoj, zorgoj kaj seniluziigoj.

La plimulto de situacioj, kiujn ni timas, neniel minacas nin, esti konscia pri tio permesas al ni por lerni el malsukcesoj kaj sekve ĝui situaciojn, kiuj antaŭe havigis al ni sendormajn noktojn.

Analizi la malsukcesojn, kaj lerni el ili

El ĉiuj malsukcesoj ni povas krei sukcesojn, se ni konsideras ilin, kiel eblecoj por lerni. Ili estu malkaŝendaj elementoj por lerni anstataŭ por timi pluan agadon. El malsukcesoj povas kreski brilaj novaj ideoj!!!

Ni nur sukcesas disvolviĝi se ni akceptas la konstantan konfrontiĝon de niaj ideoj kun la ĉirkaŭaĵo. Plej brilaj ideoj ne multe helpas nin, se ili ne kondukas al pli da aktiveco.

Studado konduki nin al pli da agado. Ju pli konkretaj estas niaj pensoj, des pli grandaj estas la ŝancoj, ke la realigo efektiviĝos.

Konfrontiĝo kun la ĉirkaŭaĵo ankaŭ postulas "malferman pardonon" ĉe tiuj personoj, kiujn ni volas atingi. Modernaj reklamistoj malkovris, ke ne tiom gravas la enhavo de nia


Teorio

mesaĝo. Unue necesas krei etoson tiel, ke la persono, kiun ni alparolas, sentu sin komprenata, spertu iom da komuneco. En tia etoso kreiĝas malfermece por ĉiaj mesaĝoj kaj la rezisto estos minimuma.

Ni lernu de reklamistoj

Pli bone eblas konvinki per konkordo ol per konkero! Ni lernu de reklamistoj, kiel eblas krei etoson de malfermece por niaj mesaĝoj. Ni sekvu laŭeble nacilingvajn kursojn pri la malfermo de enirkanaloj al la publiko, kiun ni volas atingi.

La rezultoj de nia agado ne unuavice dependas de la nombro da kunlaborantoj, sed de la profesieco de niaj laboroj.



Pli profesion laboron!

Profesiulo uzas nur tiun kapacitojn, kiujn li nepre bezonas por plenumi sian taskon, tiel li akiras maksimuman rezulton per minimumo da energio.

Por konduki niajn aktivulojn al pli profesia laboro, ni kreu etoson malstreĉan, memfidan, ni havigu laŭeble modelojn de sukcesa, efika laboro en la formo de konsilaroj, raportoj pri alies spertoj aŭ kursoj.

Unu el la kvalitoj de profesieca laboro estas konservo de nia ebleco por percepti la ĉirkaŭaĵon, eĉ dum iom koncernita laboro, do por percepti panorame. Tamen, la plimulto de la homoj fariĝas iom trostreĉitaj dum la laboro kaj pli kaj pli fokusas sian atenton al la plenumendaj taskoj. Tiel perdiĝas la plej granda parto de la kapacitoj kaj ankaŭ perdiĝas la kontakto kun la ĉirkaŭaĵo. Multaj esperantistaj aktivuloj suferas pro tro da fokuso al esperanto kaj krispita sinteno al la ekstera mondo. Tiel ili perdas la eblecojn por percepti kion diras aŭ pensas neesperantistoj.

Nia konscio estas valorega

Por povi percepti panorame kaj resti en bona kontakto kun la neesperantista mondo, necesas etoso de plenfida malfermece por ĉiu ajn ideo pri kaj eĉ por ĉiu ajn atako kontraŭ esperanto. La konscio, ke neniu diraĵo, eĉ ne primoko povas ŝanĝi niajn proprajn agrablajn spertojn, sendube multe helpas nin.

Ivo Durwael (Belgio)

estinta estrarano de UEA pri informado

La Papago

Dum vi kontribuas al la Papago, jen kelkaj novaj eblecoj:

- » Premu * por fini la kontribuon kaj daŭrigi la aŭskultadon de la gazeto.
- » Premu 61 se vi estas malkontenta kaj volas rezigni vian kontribuon.

La venonta pliboniga paŝo estas krei reton de tiaj servoj en multaj urboj tra la mondo. Ili tiam povos interŝanĝi voĉajn artikolojn. Kiuj ŝatus okupiĝi pri komputilo en sia urbo por tiu reto, bonvolu kontakti min ĉe la ĉi-suba adreso:

Patriko Monja,

7491, av. de Gaspé, Montreal, Quebec, Kanado, H2R 2A3. Tel: +1-514-2708856

Por atento de orient-eŭropanoj (telefonsistemo kun pulsaj signaloj)! Vi sciŭ, ke La Papago estas atingebla (aŭskultebla kaj ĉe la fino alparolebla) de iu ajn lando, sed la servojn (, #11 ktp) vi povas uzi nur se vi havas klavan telefonon kun ŝaltilo pulso-ono! Por telefoni vi devas kiel kutime, sed poste vi devas transŝalti al tono-reĝimo, kaj tiel uzi la servojn. La klava telefono mem sen pulso-ono ŝaltilo ankoraŭ ne sufiĉas! Kontrolu vian aparaton! La red.*

Faka aplikado

Ĉu la internacia komerco bezonas esperanton?

Lingvo ne estas celo (nur kiam oni studas ĝin literaturcele), sed ilo: komunikilo. Edukado — instruado komplikiĝas: oni devas studi tro multe da fakoj: por ĝenerala socia klerigo kaj por sia fako, metio, profesio. Mankas tempo por studi multajn lingvojn. Eŭropanoj ofte ne tiom perceptas tion, ĉar studo de alia eŭropa lingvo ne estas tiom malfacila por talentulo, sed por ĉinoj kun sia tute alstrukturata lingvo tio estas grandega problemo. Ili devas investi tiom da tempo en lingvoinstruado, ke restas tro malmulta tempo por aliaj studceloj. Estas severa handikapo kaj tiel rezultas en diskriminadon: en la komunikado, en la negocado. Tio estas neakceptebla situacio.



La esperanto-movado kunkulpas pri malĝusta reputacio de la internacia lingvo. UEA tro flegis esperanton kune kun la In-

terna Ideo en la literatura kampo, en la "mola sektoro" kiel celo en la granda rondo familia.

Zamenhof semis, la esperanto-movado flegis, verdigis la planton. Nun venas la horo de la vero; la tempo por rikolti.

Ĉu la planto portas fruktojn?

Multaj ĉinoj, sed ne nur ili, lernis esperanton por praktikaj celoj. Kaj nun ili sin prezentas: "Ni volas rikolti". "Ni volas apliki esperanton en nia profesio: ekonomio, komerco, aplikata scienco, tekniko". Kaj nun montriĝas, ke Eŭropo, la *semujo* (= *samenhof*) de esperanto, la sidejo de UEA, ne estas tiom progresinta. Ni ne estas pretaj! Ni ne bone faris nian taskon. Kiel sonas unu mano aplaudanta?


La lingvo ne kulpas. Vi en Ĉinio faris la ĝustan elekton. Sed ne faru nian eraron; ne estu tro moderaj. Esperanto travivis jarcenton sukcese; ĝi pruvis sian utilon. **Postulu de viaj partneroj la aplikon de la Internacia Lingvo.** Se ili ne volas kunlabori, lasu ilin investi: donu al ili elektablecon, vi lernu ĉu esperanton, ĉu la ĉinan.

Donu pli favorajn negockondiĉojn al komercpartnero, kiu pretas negoci ĉu en esperanto ĉu en la ĉina.

Mono ĉiam estis bona persvadilo. Postulu de UEA, ke ĝi sekvu vian filozofion.

Esperanto estu vendata laŭ la modernaj merkatumadaj metodoj. IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) jam pe-

nas, sed bezonas helpon. Ĝuste komercistoj estas ege okupataj homoj kun malmulte da libera tempo.



China Aktief (vidu en *EVENTOJ* julio (1)-92, suplementa paĝo) en Oostende, Belgio montras, ke vi pravas. Vi elektis la ĝustan lokon por via prezentado. Benelukso estas la 4-a ekonomia potenco en la mondo, post Usono, Germanio kaj Japanio, kaj en Belgio naskiĝis kaj loĝas la EK (Eŭropa Komunumo), ido de Benelukso. Ĝi estas la ĝusta loko por montri, ke ekonomia komunumo celanta internacian komercan kunlaboron, signifas ankaŭ aplikon de komuna lingvo, ne nur ene de la EK, sed speciale eksteren, precipe al nia partnero de la estonteco: Ĉinio!

Inĝ. Kees RUIG,

ĉefkonsilisto pri internacia komerco de la Ĉambro de Komerco kaj Industrio por Nijmegen k.ĉ. Postbus 38200, B-6503 AE Nijmegen, Belgio.

Kontaktoj serĉataj

La "Movado de Liberaj Demokratoj" serĉas kontaktojn kun liberaj demokratoj en diversaj eŭropaj landoj por komune lanĉi esperanton kiel lingvon de la Unuiĝanta Eŭropo.

ul. Dubois 3, Pk. 16,
PL-50-952 Wrocław 17, Polio.
Tel./fakso: +48-71-226954

Manifesto por nova Eŭropo



La Esperanto Fako de Naturamika Internacio (TANEF) aperigis la manifeston ankaŭ en esperanto.

La kajero prezentas la tekston de la tuta - cetero tre racie vortumita

- deklario, prezentas la naturamikan movadon, kaj listigas la prioritatajn agad-terenojn.

La 16-paĝa eldonaĵo - redaktita de Dies Krombeen (NL) - havas simpatian, allogan, tamen ne fanfaron-luksan aspekton, entenas 16 paĝojn en formato A/5, kaj estas havebla ĉe:

E-Fako de Naturamika Internacio, TANEF,
Pk. 225, CH-4003 Basel, Svisio.

Komerca aplikado

Nia firmao "Amikaj adresoj" funkcias ekde 1991. Ni eldonas la samnoman dulingvan (rusa kaj esperanta) gazeton, kaj peras kontaktojn de rusiaj kaj eksterlandaj entreprenoj pri komerco, kulturo, scienco.

Se vi serĉas tiajn kontaktojn en Siberio, turo vin al ni! Multaj Siberiaj firmaoj serĉas eksterlandajn partnerojn, sed la lingvaj problemoj forte malhelpas. Per esperanto ni povas helpi kaj al vi, kaj al ili! (Vidu ankaŭ nian ĵurnalon).

Amikaj Adresoj, Andrej Grigorjev,
Pk. 2420, RUS-660075 Krasnojarsk, Rusio.
Telefona: +7-391235259.
Fakso: +7-3912-223513

Esperantista turisma firmao "UNIVERSO", funkcianta jam du jarojn, serĉas kontaktojn al aliaj e-firmaoj en la tuta mondo. Nia adreso:
pk. 130, RUS-197022 Sankt-Peterburg, Rusio.
telefono: +7-812-2344759,

Resumoj en esperanto en edukscienca revuo


Al ĉiuj interesatoj pri instru-teknologioj kaj pri uzado de la Internacia Lingvo en sciencaj kampoj:

Nia Centro de Esploro pri Teleinstruado (CRIAD), kadre de Klerigscienca Departamento en Roma Universitato "La Sapienza", jam de 6 jaroj okupiĝas pri malĉeesta (tele-)instruado.

Arangante perfektigajn malĉeestajn kursojn por miloj da instruistoj de la italaj lernejoj, ni planas kaj eksperimentas novajn kurso-modelojn kun aŭtomata pritaksado de lernosukcesoj kaj alpersonigo de la instru-materialoj.

Pasintjare ni lanĉis novan revuon ("LAD - Istruzione a Distanza") pri niaj temoj, kun kontribuoj de fakuloj el la tuta mondo. La revuo aperas en la itala lingvo, tamen la esej artikoloj en ĝi havas resumojn en la franca, angla,

hispana, germana kaj esperanta lingvoj. Eldoniĝis jam 4 numeroj, kaj la 5a estas presata. Verŝajne ĝi povas interesi vin kaj viajn kole-



gojn. Al petontoj ni povas sendi senpagan specimenon. Dankon pro via kunlaboro:

Mauro La Torre
Dipartimento di Scienze dell'Educazione,
Via del C. Pretorio 20, I-00185 Roma, Italio.
Tel: +39-6-4957805, fakso: +39-6-4452642.

Organizaj demandoj

La 77a Universala Kongreso okazis en renoma eŭropa urbo Vieno. Dum la UK kunvenas kaj kunsidas la plej alta forumo de la organizo, "la" komitato, kaj ĝuste pro tio oni nomas la aranĝon "kongreso".

Vieno anstataŭ Prago

La ĉi-jara UK havis jam en la prepara etapo neordinarajn trajtojn. En la lasta momento - malgraŭ protesto de pluraj komitatoj kaj vienanoj - oni trudis ĝin al la esperantistoj de Aŭstrio. La komitato estis persvadita pri la neceso kongresi en Vieno, ja laŭ la koncernaj respondeculo en la planita urbo Prago estas malstabileco en la politika-ekonomia vivo, male en Vieno oni certigos tre favorajn prezojn, sekve la kongreso donos grandan profiton.

Esperantistoj de Aŭstrio estis malpli facile konvinkeblaj, ili ne invitis la Universalan Kongreson, nur asistis (cetere altnivele kaj entuziasme) al la Centra Oficejo de UEA.

Nun, post la UK ni jam vidas la eraran decidon de la koncernaj respondeculoj kaj UEA-Estraro: en Prago la ŝanĝoj estis kalkuleblaj, okazis neniu politikaj-ekonomiaj perturboj kiuj danĝerigus UK-n, sed male Vieno donis grandegan malprofiton, malgraŭ tio ke oni ŝparis en ĉiuj kutimaj rubrikoj, eĉ ĉe informado al la publiko (eĉ en la apuda domo de la kongresejo - oficejoj de Unuiĝintaj Nacioj - oni ne rimarkis la unusemajnan kongreson. Ĉu la Estraro kiajn konkludojn tiros post la maltrafaj decidaj?

La temoj de la Komitato

Kiel kutime la gvidorgano de UEA kunsidas dum UK. Ĉi-foje la komitato kunsidis en Vieno 6 foje, kaj traktis la jenajn temojn:

- elektoj: "C" komitatoj, kaj estraro
- en komitataj laborgrupoj: faka agado; lingva evoluigo; statuto de UEA; financoj, revizio de la statuto, generaciaj demandoj en la movado, aliĝpetoj, komitata labormetodo;
- dum ĝenerala kunsido: raporto pri la pasinta jaro
- aliĝpetoj de landaj kaj fakaj asocioj
- kunlaboraj kontaktoj
- rezolucioj
- regularoj
- estontaj UK-j.

Sube mi raportos pri kelkaj el inter la traktitaj temoj.

La elekto de la nova estraro

Ĉi jare la Komitato havis specifan taskon, ja elektis novan estraron. La elektoj estas kernaj punktoj de ĉiuj organizoj, pro tio indas detale analizi la proceduron kaj la rezulton.

La opinio de la Elekta Komisiono (E.K.) iom haste prezentis al la Komitato Renée Triolle. Ne estis kontraŭregula, tamen por multaj ne estis kontentiga la bagateliga prezento de la kandidatoj: la elekta komisiono ne prezentis skribe la kandidatojn, ne estis dissenditaj

La muroj ne falis

Kritikaj pensoj pri la 77a Universala Kongreso

iu ajn skribaj fidindaj kaj detalaj informoj pri la kandidatoj nek antaŭ nek ĉe la komenco de UK; nek la prezidanto nek la aliaj kandidatoj prezentis sian planon por la sekva periodo; la estraro ne respektis la proponon de la elekta komisiono pri la taskodivido en la elektota estraro; la nova estraro ne transprenis, sekve ne daŭrigas la komencitajn agadojn de la antaŭaj estraranoj.

La Elekta Komisiono prezentis sepkapan estraron kun difinitaj taskoj: John C. Wells - prezidanto, Ulrich Linz - vicprezidanto, Ian Jackson - ĝenerala sekretario, Hans Bakker - financoj, Mark Fettes - informado, Michela Lipari - kulturo, William Harmon - faka agado. Krom ili estis tri kandidatoj: Brunetto Cassini, Oszkár Princz, Gilsu So.

La komitatoj diskutis ĉefe unu mankon de la propono: mankon de reprezentigo de azia kaj eŭropa movadoj. En la propono de E.K. estis neniu el Afriko, Azio kaj orienta-suda parto de Eŭropo.

Ĉu kunlaboran aŭ reprezentecan estraron?

Dum la diskuto batalis unu kontraŭ la alia du opinioj:

- » la estraro estu malgranda (7 personoj), kunlaborema stabo, kun spertuloj;
- » en la estraro estu reprezentataj krom Okcident-Eŭropo ankaŭ la fortaj mondopartoj de Esperanto-movado (9 personoj).

La argumentoj de la unua grupo estis ĉefe financaj; ŝpari kostojn (du-kvar mil guldenoj jare), dum la dua grupo akcentis la gravecon de tutmondiĝo kaj la speguligon de disvastiĝo de Esperanto ankaŭ en la Estraro.

La Komitato finfine elektis 7 kaptajn estraron. Iom da statistiko: estis elektitaj 2 estraranoj el Anglio, 1 el Germanio, 1 el Nederlando, 1 el (Nederlando) Kanado, 1 el Italio, 1 el Koreio. El la 7 estas 5 (6) el la Eŭropa Komunumo, el la 7 estas 1 virino.

Ĉu malpliigi la rabatojn?

La rezulto de la elektoj ĝuste ĉi jare estas anakronisma, kiam la kongreso traktis la temon "Kiam falas la muroj de miljaroj: komuna eŭropa domo". Ĝis la fino de UK plu grandiĝis la distanco inter la rezolucioj kaj la realo. En rezolucioj ni legas, ke la 77a UK "ALVOKAS la Estraron de UEA urĝe ellabori, en konsiliĝo kun la landaj asocioj, konkretan planon, kun realisma atento al la disponeblaj rimedoj, por laŭeble mildigi la efikon de aktualaj ekonomiaj malekvilibroj inter la landoj de Eŭropo por la agado de esperantistoj"; kaj alie "ATENTIGAS pri la neceso kreskigi ankaŭ kunlaboradon inter Eŭropo kaj aliaj kontinentoj". Sed en la praktiko malpliigis la rabato de esperantistoj de malriĉaj landoj por UK, ne estis akceptita

la proporcia membrokotizo (ekz. al la nacia enspezo), publike estis levita (kontraŭstatuta, ĉar diskriminacia) propono, kiel malhelpi la aliĝon de malriĉaj kongresanoj (ekzemple poloj) al la sekvontaj UK-j? (La pola komitatano ne ricevis respondon post sia protesto!)

Viglaĵn reagojn rikoltis ankaŭ la modifo de kongreskotizo. Iom da kontraŭstaro spertebulis pri la altigo de baza kotizo, ja pluraj asertis ke la altigo okazas nur pro la malbona negocado de ĝenerala direktoro pri la kongresejo en Vieno, kaj ĉar en Valencio oni senpage donos la kongresejon, la propono perdis sian bazon.

Proporcion ŝarĝoportadon!

En la diskuto leviĝis iu tute nova penso, kiu - verŝajne pro ĝia nekutimeco - restis sen reĥoj. Ĝin prezentis komitatano el Orienta Eŭropo kaj temis pri proporcia ŝarĝoportado en UEA. La esenco estas, ke oni trovu demokratian solvon por la kotizado, ke la anoj de UEA kontribuu al la kostoj proporcie.

La kotizoj en UEA jam nun ne estas la samaj, sed ĝian principon neniu konas, krome ĝi tute ne estas kontentiga. Unu el la principoj povus esti - jam tuj - ekzemple la nacia enspezo de la lando, kaj la kotizo diferencus laŭ ĝi.

Alvoko por ne-kontraŭvoĉdoni...

La diskuto en la komitato pri la novaj aliĝintoj por tiuj kiuj ne partoprenis la laboron de komitata laborgrupo, ŝajnis foje ke oni parolas iun idon de lingvo esperanto, ja la vortoj eĉ foje ankaŭ la frazoj estis kompreneblaj, tamen la esenco de la diskuto restis sekreto. Temis pri la aliĝpetoj de landaj asocioj el la iama kaj nuna Jugoslavio. Por certaj aliĝontoj oni starigis hardajn postulojn por allaj eĉ ne pretan statuton (povus esti, ke la Komitato akceptis landan asocion kies statuto estas kontraŭ tiu de UEA). Ankaŭ ne estis komprenebla

kial UEA ne respektas la decidon de Unuiĝintaj Nacioj pri la militantaj landoj-respublikoj de Jugoslavio. Dume okazis fortaj politikaj konfeso (en la plej alta forumo de politike neŭtrala UEA), agitoj pro kaj kontraŭ, eĉ alvoko al minimume sindeteno por tiuj kiuj volus kontraŭvoĉdoni!


Rezolucioj por tirkesto

La kongreso, kiel kutime, dum la fermo akceptis diversajn rezoluciojn, - rezoluciojn por tirkesto - kiel reagis unu kongresano kiu ne povis ilin akiri en Vieno. Ĉu ekzistas novaj agentejoj kiu aperigos ilin (aŭ citos el ili) se ili ne atingos la agentejon en la lasta tago de la kongreso?

R.Ĝido



AUSTRIA CENTER VIENNA
5.




el Debrecena Bulteno n-ro 42.

Aranĝoj

Internacia Seminario de GEJ

IS translokiĝas!

En la origina ĉi-jara IS-ejo oni malebligis la uzon de la gimnastikejo kiel tranoktejo por memzorgantoj, tial la tuta aranĝo IS (kio ja estas la plej granda internacia junulara aranĝo, kun partopreno kutime de ĉ. 400!! gejunuloj) translokiĝas. (28.12.92.-03.01.93.)



La nova IS-ejo estas en Bad Kleinen (norda Germanio), kio estas eĉ pli bone atingebla trajne.

La partoprenkotizo por memzorgantoj estas malaltigita (inter 50-150 DEM), kaj por ili ankaŭ la unua aliĝperiodo estas plilongigita ĝis la unua de novembro.

Esperantistoj el CS, H, PL, eks-YU bv. atenti, ke la aliĝo validas nur post la ricevo de antaŭpago!


Kun la supraj ŝanĝoj vi povas uzi la malnovan aliĝilon, aŭ vi povas peti novan ĉe:

*Germana E-Junularo, Berlina Oficejo
Unter der Linden 38, DO-1086 Berlin, Tel:
+49-30-20340564
laŭ Koncize 5/92, U.M.*

26a Konferenco de ILEI

Pli granda, internacia kaj aĝvaria

Kun 112 partoprenantoj el 23 landoj, la 26a ILEI-konferenco en Bratislavo (Slovakio) estis la plej granda kaj internacia de la lastaj jaroj. Dank' al la situo, kolegoj el Polio, Rumanio, Hungario kaj Bulgario povis unuafoje partopreni, dum instruistoj el Aŭstralio, Argentino, Islando, Israelo, Usono kaj Zairio kompletigis la internaciecon. La aĝvario estas



M. Belošević (HRV), Stefan MacGill (H) kaj Ernő Geleta (CS)

dankebla al nova iniciato de ILEI, gimnazia semajno por 13-16 jaruloj paralele aranĝita.

Ĉeftemo de la konferenco estis la vivo kaj lingvo-instruaj teorioj de la pionira pedagogo Komenio, kies 400-jaran jubileon oni nun ce-

lebras. En la malfermo gast-prelegis la vicprezidanto de UEA d-ro Ulrich Lins pri "Edukado kontraŭ naciismo". Dum la semajno okazis deko de pliaj prelegoj, kaj ankaŭ Cseh-seminario.

Estis akceptitaj du novaj landaj sekcioj: Kroatio kaj Rumanio. La aliĝpeto de Kubo estos poŝte traktita. Sur la eldona kampo konkreta atingo estas la apero de la dua kaje-ro de la porjunulara lernolibro "Tendaraj Tagoj". Okazis parta estrarelektio, per kiu reeniris la gvidan organon d-ro Till Dahlenburg el Germanio.

Dum la UK en Vieno la Komitato de UEA akceptis regularon por la supera nivelo de la ekzamenoj de UEA/ILEI.

Instruista kurso

Por spertigi en la situaci-komunika lingvo-instruado ILEI organizos specialan kurson por e-instruistoj inter 6a kaj 9a de novembro en Poprad, kun tre modera partoprenkotizo. (Vidu pli detale

en EVENTOJ aŭgusto (2)-92).

Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe ILEI:

Eső u. 7, H-1034 Budapest, Hungario.

Esperantistaj komunistoj kunvenis en Aŭstrio Konferenco de Kolektivo Esperantista Komunista

Tuj post la UK en Vieno, okazis en Leoben (urbo situanta en Karintio) la Sepa Konferenco de Kolektivo Esperantista Komunista (KEK), de la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto. Tie partoprenis esperantistoj el diversaj eŭropaj landoj; bedaŭrinde la nunaj ekonomiaj malfacilaĵoj malebligis la ĉeeston de esperantistoj el iamaj socialismaj landoj.

La konferenco traktis diversajn temojn, rilate al la nuna situacio en la orient-eŭropaj landoj, kaj rilate al la agado de la kolektivo de tiu ĉi specifa periodo. Ĉefe pri tiu ĉi lasta temo, la konferenco decidis unue nuligi la statuton iam aprobitan dum la sesa konferenco de KEK en Ruse (Bulgario) en 1989, ĉar ĝi montriĝas tute neaktuala; elektis novan estraron, kaj decidis pri la estonta agado de la asocio. Anstataŭ ol renovigi statuton, la konferenco aprobis kelkajn gvidliniojn, kiuj devos esti la inspiro por la venontaj jaroj; tie oni klarigas, ke la kolektivo estas malferma asocio al ĉiuj, kiuj volas kunlabori pri la plej gravaj problemoj de la momento, kaj ke marksismo-leninismo estas la ideologia bazo de la asocio, sed ĝi ne estas nepre kondiĉo por la aparteno de la membroj al la kolektivo.

Oni poste decidis kelkajn renovigojn en la redaktado de la bulteno "Internaciisto". En la nova estraro ne plu estas la vicprezidantoj kaj la kasisto; ĝin nun komponas iu prezidanto, en la persono de Anatolij Surnakin (Moskvo), kiu reprezentos la asocion, kaj estrarano por la rilatoj inter la kolektivo kaj la aliaj fakaj asocioj kaj ceteraj eksteraj rilatoj. Al tiu lasta tasko la konferenco elektis Paolo Cerretini (Italio). La taskoj de la kasisto estos en la manoj de la redaktoro de la bulteno. Krome, estos starigita ankaŭ reto de landaj delegitoj, kiuj devos zorgi pri informado en iliaj respektivaj landoj, aŭ grupo de landoj, pri kiuj ili respondecas.

Same funkcias ankaŭ libroservo, kie estas disponeblaj diversaj eldonaĵoj.

Interesa substrekinda aspekto estas, ke la konferenco okazis en ejoj de loka komunista partio. Siatempe, la Aŭstra Komunista Partio adoptis rezolucion favoran al la uzo de esperanto.

Pliaj informoj pri KEK ĉe:
"Internaciisto", c/o Franz Schick, Erzstr. 11.
A-8704 LEOBEN, Aŭstrio.

Post la konferenco la partoprenantoj povis ankaŭ ĝui ekskursojn en la bela urbeto Leoben kaj ĉirkaŭaĵoj.

Paolo Cerretini

Silvestra festo en Praha!

Ni invitas ĉiujn por 5 taga restado en Praha por fino de la jaro kun silvestra programo. La prezo nur 250 DEM por loĝado, manĝado kaj ekskursoj.

Pliaj informoj ĉe:
INTERHELPO, pk. 44, CS-150 00 Praha 5,
Ĉeĥoslovakio
Telefono & fakso: +42-2-542993.

Alvoko!

Artistoj kaj metiistoj, bonvenon en la Festo por Eŭropo

Dum la Pentekosto 1993, la urba turisma asocio en Saint-Lambert-du-Lattay, je 23 km-oj de Angers, Francio, planas aranĝi per esperanto feston pri Eŭropo, kaj por tio serĉas tut-eŭropajn artistojn kaj metiistojn, kiu povus individue aŭ grupe prezenti ion pri sia lando!

La urba turisma asocio prizorgos la gastigadon. Estas ebleco ankaŭ por interkonsento pri la repago de vojaĝkostoj. **Ni petas de la legantoj de EVENTOJ transdoni tiujn ĉi informojn al iliaj esperante parolantaj artistoj kaj metiistoj konatoj.**

La interesatoj devas sin turni al:

*Esperanto-grupo en Coteaux-du-Layon,
B.P. 5, F-49750 Saint-Lambert-du-Lattay,
Francio.*

Proksimaj limdatoj

26.09-02.10. Internacia Foiro de e-turismo, Bydgoszcz
01-04.10. Vina Seminario, Bzenec, Ĉeĥio.

03-03.10. Konkurso pri Arta Kreado, Vilnius, Litovio.
08-11.10. Montkastela Renkontiĝo, Trofaiach, Aŭstrio.
09-12.10. Interlanda Konferenco pri Instruado, Saenz-Penjo, Argentino
06-09.11. Kurso por e-instruistoj, Poprad, Slovakio.
11-15.11. BELaj Tagoj, Poprad

Movado

Informa dorsosako

estas projekto de la Nederlanda E-Junularo dotita per 5000 guldenoj, kies celo estas trovi pli bonajn varbilojn kaj argumentojn por la e-movado. Nun oni kolektas propagandilojn (afiŝojn, flugfoliojn), ankaŭ nacilingvajn. (Ĉu ĈSFR kolektas ilin Vladka Chvátalová, Vysočanská 763, CS-582 91 Světlá n.S. Kaj kiu ĉe Vi?)

Adreso de Nederlanda E-Junularo:

Cora Brink, Betrixstraat 36, NL-7511 KL Enschede, Nederlando. Tel: +31-53-310796.

Drezen: Historio de la Mondlingvo

La firmao "Ruthenia" estas universala komerca entrepreno kun speciala intereso pri orient-okcidentaj interrilatoj. Ĝia nomo estas latina vorto, konata de la mezepoko kaj signifas: *Ruslando*.

La firmao subtenis la eldonon de la klasika verko de Ernesto Drezen: *Historio de la Mondlingvo*, kaj okaze de la centjara jubileo, ĝis la 14-a de novembro (naskiĝtago de Drezen) ofertas ĝin kun speciala rabato (30 USD). Post la jubilea periodo la prezo estos 36 dolaroj. Se oni mendos pli ol 10 ekzemplerojn, la prezo reduktiĝos je 20, resp. 24 USD.

Speciala rabato por eks-sovetianoj kaj orient-eŭropanoj: Se oni trovas tri aĉetantojn kun okcidenta valuto kontraŭ normala prezo, la peranto ricevos unu libron senpage.

Ruthenia, pk. 15,

RUS-111524 Moskvo, Rusio.

Tel. fax: +7-095-2926511 interling 7790

Japana pupeteatro en Kroatio

Syonai Dewa-Ningyo Sibai

La japana pupeteatro *SYONAI DEWA-NINGYO SIBAI* post prezentiĝo en Aŭstrio en Slovenio gatis en Kroatio kie la anas japane ensemblo ekde la ekzisto de la nova ŝtato. La ensemblo gvidis konata japana esperantistino s-ino Kikuŝima Kazuko.

La turneo ampleksis 4 prezentiĝojn en la urboj Varazdin kaj Zagreb. Koincide, la prezentaĵoj "Ombrel-danco de Dewa" kaj "Bravulo KASUGA Kumanzyo submetas niktoreutaĉon" gatis ĝuste en la tago de la datreveno de la atombombo en Nagasaki, kaj la gastoj al sia publiko distribuis ankaŭ la

La unua esperanto-grupo en Bolivio

En la bolivia urbo Cochabamba estis organizita baza kurso laŭ Cseh-metodo, gvidata de Atiljo Orellana Rojas el Argentino, nuntempe UEA-volontulo. Al la kurso aliĝis 14 personoj, kaj ĉiuj restis ĝis la fino; eĉ post la kurso la partoprenintoj fondis la unuan e-grupon en Bolivio. La kursgvidinto petas helpon el la tuta mondo por kuraĝigi ilin: bv. sendi leterojn, poŝtkartojn, librojn, vortarojn ktp. al la kontaktadreso:

*S-ino Wilhelmine Verhaaf,
Casilla 3945, Cochabamba, Bolivio.*

RINGO

porinfana revueto en esperanto aperis komence de januaro '92. Ĝi estas eldonita por infanaj membroj de Ĉeĥa kaj Slovaka Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj-Handikapitoj.

Ni esperas, ke por ĝi kontribuos ĉefe infanoj mem. Ĝi estas dissendita senpage - ja la eldonadon financas la Fondaĵo *Ringo* - por disvastigo de esperanto inter la infanoj de ĈEA. Ricevi ĝin povas ankaŭ infanoj, kiuj ne estas membroj de la menciitaj E-Asocioj, sed nur kontraŭ interesa letero, poemeto aŭ desegnaĵo por *Ringo*! Skribu al:

*Karel Daneš, RINGO, pk. 425, CS-660 25
Brno 2, Ĉeĥoslovakio.
el Starto, 1/92.*

Asocio de publika utileco

La urbeŝtraro de Madrido (Hispanio) dum sia plena kunsido de novembro 1991. akceptis Madridan Esperanto-Liceon (MEL) kiel "Asocio de publika utileco". MEL estas la unua hispana Esperanto-societo, kiu atingis tiun socian rekonon. (N.V.)

Heroldo, n-ro 4-5/1992.

Lingvo

AKTIVECO - AKTIVAĴO

Mi ĝis nun vane atendis reagon de personoj, pli kompetentaj ol mi, rilate al la ofta misuzo de la vorto *aktiveco* (ĉefe far francoj, verŝajne pro la pluraj sencoj de tiu vorto en la franca lingvo).

Nia kara Plena Ilustrita Vortaro PIV bonvolu pardoni min ke mi intervenas nun kontraŭ ĝi. Vidu la radikon *aktiv-* sur la paĝo 24. Laŭ mi, *aktiveco* estas karaktero, eco de iu aktiva, dum io, pri kio oni aktivas, devas esti *aktivaĵo*, kaj mem la faro *aktivado*.

Ekzemple, "la *aktiveco* de Henriko estas unu el liaj ĉefaj karakteroj, el ĝi fontas lia kapablo plenumi multajn *aktivaĵojn*".

Aktiveco estas karaktero, ĉu ne? Ĉu oni povas plenumi karakteron?

Ni ne ekkonsentu pri escepto, ĉar de escepto al escepto nia lingvo kaskade disfalo kaj fuŝiĝos.

*Marcel Ternant
el SAT-Amikaro, decembro 1991.*



Afrika agado

Faka instruado per esperanto

Esperantisto 32-jara, instruisto en teknika kolegio en Nsukka, Niĝerio, deziris plibonigi siajn kvalifikaĵojn studante librotenanadon, aŭ pli vaste, financan administradon. Li prezentis sian aliĝon al niĝeria universitato plurfoje, sen sukceso. Verŝajne la nombro de kandidatoj multe superas la disponeblajn lokojn.


Tial li per anonceto en la Revuo Esperanto serĉis instruanton pri tiu fako, preferente en anglalingva lando, por ke li povu uzi anglalingvajn librojn. Ne venis respondo. Eĉ se li studus hejme, perkoresponde, sen registriĝo en oficiala kurso (kaj sekve sen oficiala diplomo), li tion volonte farus. Eble li poste povus, jam finlerninte la fakon, aliĝi al ekzamena sesio ĉe iu instituto, kaj akiri diplomon aparte.

Ĉu vere neniu fakulo pri librotenanado kaj financa administrado volas instrui al tiu ĉi bona esperantisto? Se jes, jen lia adreso:

*Evaristus Attah,
P.O.Box 234, Nsukka, Enugu State, Niĝerio.*

Estus bele, se esperanto tiel servus al klerigado, kaj se esperantistoj tiel servus unu la alian.

Hans Bakker, Nederlando



paperaĵajn grauojn - simbolojn de la beno kaj bondeziro en la japana kulturo. Tiel la gastado de japanoj samtempe signifas la pactagon en la lando, kie la milito ankoraŭ ne estingiĝis.

La tuta turneo okazis dank' al esperantista organizado, ĉefe de Spomenka Ŝtimec. La ensemblo kun granda sukceso prezentiĝis antaŭ la kongresa publiko en Vieno.

Kontakt-adreso de

la du-persona pupeteatro:

*Syonai Dewa-Ningyo Sibai, Yamagata-ken,
Sakata-si, Ooaza Hirono,
Aza Kamidoori 91, J-998-01 Japan.
Tel: +81-234-924114,
fakso: +81-234-924115.*

Propagando

Kiel propagandi?

Unu el multaj ebloj, kiel propagandi bone kaj efike nian esperanton aŭ la movadon, estas utiligi specialan servon de la poŝto. Temas pri ne tro multekosta eblo: niaj kluboj, sekcioj kaj aliaj organizaĵoj povas pagi kliŝon por afrankmaŝina stampilo uzata en poŝtoŝtancoj, kiu per ĝi afrankas milojn kaj milojn da sendaĵoj. Per tiu maniero renkontadas kun esperanto kaj la movado multe da homoj kaj enlande, kaj eksterlande. Por lokaj kondiĉoj kontaktu vian ĉefan poŝtoŝtancojn! Kontaktadreso de konkreta klubo, kiuj jam uzas tiun manieron:


*Klubo ESPERANTO, Vladislav Hasala,
pk.34.CS-696 62 Strážnice, Ĉeĥoslovakio.
laŭ Starto, 6/1991.*

Esperanto en radio

Nova horaro ĉe Radio Havano

La Esperanto-Redakcio de Radio Havano Kubo informas, ke pro financaj malfacilaĵoj la radiostacio devis malpliigi sian ĝeneralan elsendotempon en ĉiuj lingvoj; do, la dimanĉa eprogramo ekde nun estas nur kvarfoje elsendata, anstataŭ kvin fojoj. Ĉiuj programoj daŭras duonhoron.

En la suba horaro la elsendotempo estas indikita en UTC (= Universala Tempo). Jen la frekvencoj, validaj ĝis la 1a de novembro:



RADIO HABANA CUBA

- 08.00 11760 kHz (25 m) por okcidenta kaj norda Ameriko, krome por Pacifika Azio.
- 15.00 11760 kHz (25 m) por norda, meza suda Ameriko, kaj Karibio.
- 9550 kHz (31 m) por Karibio.
- 17.30 17705/17770 kHz (16 m) por Eŭropo kaj norda Afriko.
- 23.30 13710/11760/9550 kHz (22/25/31 m) por norda, meza, suda Ameriko kaj Karibio.

Ni ege bonvenigas viajn leterojn kaj rimarkojn.
*Radio Havano, Kubo, E-Redakcio,
pk. 6240, Habana, Kubo.*



Zhou Enlai kaj Deng Yingchao



Jen kelkaj linioj responde al artikolo "Kion signifas LKK" de s-ro J. Henriksen, aperinta en julio(2)-92.

Nu, imagu, mi skribas kelkajn liniojn por varbi por kongreso ĉi-aŭtune en Augsburg (Internacia E-Kongreso por la pli aĝa generacio). ...Mi tute ne atendis, ke miaj linioj povus provoki "lingvoscienciston". Tiu scienculo devas sin demandi, ĉu li ne scias, kio estas LKK kaj kio estas necesejo aŭ duŝo. Laŭ mia scio tiuj nocioj estas internacie konataj kaj uzataj, kaj mi ne vidas kaŭzon, kial ne uzi tiujn terminojn. ...Min ne ĉenas sciencistaj reguloj lingvaj, por mi gravas, ke la homoj en la tuta mondo komprenas miajn liniojn kaj la sencon de ili, - kaj vizitas nian kongreson.

Hermann Schmid, Augsburg

Dum la UK mi ricevis provokzempleron de EVENTOJ. La provo tre kontentigas min, kaj mi volas komplimenti vin pri bona realigo de valora iniciato. Mi opinias, ke via iniciato meritas ĝeneralan subtenon.

Permesu, tamen, ke mi iom plendu. Grande ĝenas al mi rimarki la konstantan mankon de majuskla E por la nomo de la lingvo kaj por rektaj derivaĵoj. Tian sintenon mi tre malaprobas. La nomo de nia lingvo, Esperanto, estas propra nomo. Kiel tio, ĝi meritas majusklan inicialon. Same, mia opinio ĉiuj rektaj derivaĵoj el tiu propra nomo (Esperantistoj, Esperanto-movado, Esperantisteco ktp.) same meritas majusklan inicialon. Mi scias, ke pluraj Redaktoroj, inkluzive de la Redaktoro de revuo

Filatelo

Memore al Deng Yingchao

Samideanino Deng Yingchao (04.02.1904.-11.07.1992.) estis unu el elstaraj gvidantoj de Ĉina Popola Respubliko, kaj pioniro de ĉina virino-movado. Ŝi estis ankaŭ esperantistino-pioniro, studinte la lingvon en 1913 (Popolamaso Lernejo, Pekino). Ŝi kaj ŝia edzo Zhou Enlai (05.03.1898.-08.01.1976.) estis alte estimataj de la ĉina popolo.

Longtempe antaŭ siaj mortoj ili testamentis, ke oni ne konservu iliajn cindojn post la morto, sed ilin disŝutu sur teron kaj riverojn de la patrolando. S-ano Deng Yingchao forpasis la 11an de julio 1992, kaj la 18-an de la sama monato ŝiaj cindoj estis disŝutitaj en Haihe-riveron de Tianjin, kie ŝi vivis en junaj jaroj kaj konatiĝis kun Zhou Enlai.

Por memore, la Tianjin-a Poŝtmarka Kom-

Esperanto ĝenerale ne donas majusklan inicialon al la derivitaj terminoj, sed ne ĉiuj redaktoroj tion faras. Mi petas vin ŝanĝi vian sintenon en tiu rilato.

Lawrance Mee, Belfast

Ekde la komenco ni atendis atakojn, sed Vi estas la unua, kiu faris ĉi-teman rimarkon. Ni asertas, ke ekz. "esperantisto" aŭ "esperantisteco" ne estas propraj nomoj, ili estas simplaj substantivoj, ne meritas majusklon, do ĉe derivaĵoj ni certe restos ĉe minuskloj.

Ni scias, ke en la angla lingvo la lingvo-nomojn (kaj la nomon de nacioj) oni uzas majuskle, sed en plejmulto de aliaj lingvoj - laŭ nia scio - ili estas minuskle skribataj. La samon rezultas ankaŭ nia lingvo-sento, eĉ se ankaŭ ni lernis iam - pro nekonata motivo - la malon. En la Fundamento ni ne trovis aludon, kaj la aliaj fontoj ne estis unusencaj. Se ni akceptus vian logikon, ĉiujn lingvo-nomojn ni devus skribi majuskle, kio tute kontraŭdiras al nia lingva sento. Ni scias, ke tiu minusklo "esperanto" ĉe la unua vido estas iom nekutima, sed same estus nekutima por ni vidi ekz. "Angla lingvo, Rusa lingvo, Hungara lingvo" - kio logike sekvus en alia kazo, kaj ni ne pretas fari escepton en la gramatiko nur pri nia lingvo. Ni tre malvolonte estus pretaj plene transpreni la anglan aŭ la germanan ktp. ortografion.

Do, ni restos ĉe minusklo - ĝis iu konvinkos nin. Ni esperas, ke malgraŭ tiu malperfektaĵo per la enhavo de la gazeto ni povas iom servi al vi. Kun samideanaj salutoj,

Szilvási László

Gratulojn pro la laboro pri EVENTOJ. Tia estu la vojo de esperantismo: aliri la realan mondon per realmondan rimedoj! La (mal)movado estas malmoderna, sed esperanto plu estas moderna lingvo. Por plutiligi kaj allogigi ĝin antaŭ la socio, necesas pli da malvarmaj kapoj!

Marcos Cruz, Hispanio

panio eldonis specialan bildkarton kun memoriga poŝtstampo. La bildo kompreneble montras la riveron Haihe, kaj la memoriga poŝtstampo portas ideogramojn, signifanta: *Memorigo por la disŝuto de cindoj de k-dino Deng Ying-chao al Haihe-rivero.* Sur la foto estas Deng Yingchao kaj ŝia edzo Zhou Enlai en 1970.

Ĉin Kajĝi

*Pekina Esperanto-Asocio,
Pk. 1089, Beijing, CN-100034, Ĉinio.*




Nervoj

Nia urbo nun fine posedas novan mal-sanulejon. Grandegaj estis la elspezoj, pri kiuj respondecis la skabeno. En la malfacila tasko tamen helpis lin la oficistoj de la koncerna urba fako. La komunuma estraro bezonis multajn kunvenojn por fari la necesajn kaj gravajn decidojn. En la loka gazeto aperis longaj raportoj pri la ofte malfacilaj diskutoj.

Iam oni devis decidi pri la aĉeto de ilaro por la fako "intensiva zorgo", por kiu oni bezonis plurajn centmilojn da guldonoj. Kaj, por diri la veron, la membroj de la komunuma estraro estis tiel spertaj pri tia ilaro kiel preskaŭ ĉiu homo. Por klare diri la veron: ili sciis nenion pri la temo. Kun tri frapoj de la prezidanta martelo la kunveno akceptis la elspezon. Poste oni devis decidi pri riparo de la tegmento de lerneja biciklejo. Entute dumil guldonoj... Feliĉe, la estraro nun kun zorgo plenumis sian gravan taskon. El la estraranoj ĉiuj havis spertojn kun similaj problemoj pri la propra domo, aŭ pri tiuj de iu parenco aŭ najbaro. La diskutoj pri tiu grava sumo daŭris pli ol unu horon.

Kun tiuj memoroj en la kapo mi nerve preparis min por la jarkunveno de mia esperanto-asocio. En la jarkonto de la kasisto ja aperis sumo de 1234 guldonoj, kiu fakte devus esti 1234 guldonoj kaj 67 cendoj. Kaj krome en la jarraporto mankis dufoje la litero "n" post la vorto, do vere grava eraro en oficiala dokumento.



Kaj miaj timoj praviĝis. La teruraj eraroj en la estrara laboro postulis multan tempon. Tiom, ke poste mankis la tempo por vera diskuto, kiam la estraro prezentis siajn gravajn planojn por la venontaj kvin jaroj. Oni simple aŭdis kaj aplaudis.

Kelkaj maljunaj membroj poste parolis pri valora kaj sukcesplena jarkunveno. Pro tiaj aferoj miaj nervoj suferas!

Ko NURMI
el Fenomeno, aprilo/1992.

Anoncetoj

De Francisko el Asizo por Vi... estas la plej bela libro jam eldonita pri la vivo kaj la misio de Francisko el Asizo. Krom desegnaĵoj, speciale faritaj por ilustrati la libron, estas ankaŭ fotoj de scenoj de la filmo "Frato Suno kaj Frato Luno" kaj pri pluraj regionoj de Italio. La libro kun 322 paĝoj, bela grafika prezento estas la plej agrabla donaco por Kristnasko. Prezo: 15 NLG aŭ egalvaloro. Mendu ĉe UEA aŭ:

*Spirita Eldona Societo, F. V. Lorenz,
CP 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ),
Brazilo.*

Ĉasanto el Pollando, esperantisto, serĉas samideanojn tutmonde. Li kolektas bildkartojn, esperantaĵojn kaj ĉasadajn trofeojn. *Jerry Wroblewski, PL-21-305, Suchwola, Pollando.*

Por lerni la ĉinan lingvon vi aliĝu al la Univerŝitato en urbo Chengdu! La lokaj esperantistoj helpas al vi aranĝi reduktitajn studkotiĝojn. Pliaj informoj ĉe:

*Docento Mu Bing, Chengdu Universitato,
CN-610081 Chengdu, Sichuan, Ĉinio.*

Se vi estas eldonisto, aŭ vi konas iun E-eldoniston, skribu al ni, ĉar de aŭtuno ni planas en Zagrebo starigi Libroservon!

*Kroata Esperanto-Unuiĝo,
Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb, Kroatio.*

"Intimo" vokas vin

La internacia e-familio estas realo, ĉar ni helpas al vi trovi sinjor(in)on de via koro inter multaj diversaj ĝeesperantistoj.

*"INTIMO",
Pk. 2420, RUS-660075, Krasnojarsk, Rusio.*

Internacia konkurso por lerneĵanoj

En la numero aŭgusto (1)-92 de *EVENTOJ* aperis la alvoko kaj la regularo de la konkurso. Bv. denove tralegi ĝin! **Pri la konkurso bv. averti viajn mezlerneĵanojn kaj instruistajn konatojn!**

1-a taskofolio por MEZLERNEĴANOJ


1. *tramo, taksio, aŭtomobilo, trajno, trolebuso.*
Kio estas la komuna vorto de tiuj aĵoj. (2 poentoj)
2. Kion oni uzas por matena sinpurigado? Nomu almenaŭ ses aĵojn! (3 poentoj)
3. Konstruu per la vorto "manĝo" almenaŭ ses kunmetitajn vortojn! (3 poentoj)
4. Kion vi respondas al tiu, kiu diris al vi "Dankon" pro glaso da akvo? (2 poentoj)
5. Kiu vortoparo konvenas al la suba nekompleta frazo?
Vidi vin estas ..., kiam doloras ... la kapo.
terura - vin / terure - al vi / teruro - ĉe vi. (2 poentoj)
6. Difinu per unu sola vorto:
Elektronika aparato, kiu konsistas el ekrano kaj klavaro, interalie.
Sur la ekrano aperas teksto aŭ desegnaĵo laŭ la programo. (2 poentoj)
7. Kie okazis la ĉi-jaraj Olimpikoj (urbo, lando)? Kiomaj ili estis? (3 poentoj)
8. Pri kio vin memorigas *EVENTOJ*? Kio estas tio? (3 poentoj)

Limdato (dato de la poŝta stampo): 12a de oktobro.

Kun la solvo(j) sendu poŝtmarkojn (en Hungario) aŭ respondkuponon (en transpagipovaj landoj) por la resendo de la korektita solvofolio kaj novaj taskofolioj, aŭ sendu nenion, se vi vivas en iu ekssocialisma lando. Bv. atenti pri la limdato!

La solvojn sendu al:

*Ginnazio Gárdonyi Géza, Esperanto-grupo,
Csiky Sándor u. 1, H-3300 Eger, Hungario.*



Korespondi deziras

Mi estas 13 jara, kaj mi volas korespondi esperantlingve pri ĉiuj temoj de mia aĝo. Joanna Kletkiewicz, PL-87617 Bobrowniki nad Wisla, woj. Wloclawskie, Polio.

Mi serĉas amikojn kaj korespondajn partnerojn. Rhachlioune Abdullah, 12 Impasse My Abdalhafid Maison (1), Rabat, Maroko.

Mi deziras konatiĝi kun bona homo, fraŭlo. Estus interese korespondi.

*Tokarevaja Galina, kb. Geroev Bresta 19-34,
348031 Lugansk, Ukrainio.*

SONKASEDO!

Fama verko de la fama komponisto en esperanto!

Registraĵo de viva koncerto kun profesiaj operkantistoj!

Teksto sur la interna kovrilo de la sonkasedo.

Prezo: 18 NLG. + sendokosto.

Mendu ĉe LINGVO-Studio.



EVENTOJ, esperantid nyelvű információs lap.
Nyit. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.

Készült az M & M nyomdában:
H-1181 Budapest, Bercsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Stívási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.